

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2009



*Triopo Arvo Karvinen, Aatu Moilanen, Raimo Tanskanen kun akordiono kantis vespere dum la Vintraj Tagoj. Artikolo sur p. 8.*

**Esperanton kaupallisesta puolesta, s. 6, 12**

**Estonoj konferencis, p. 5 ♦ Zamenhofin vetoomus 1915, s. 10**

**Kirjoituskilpailu Esperanton tulevaisuudesta, s. 4**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Paula Niinikorpi*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Arvo Karvinen*, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanet.fi

*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

*Vilorg Teräväinen*, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>





## La prezidanto en intervjuo

*Kiom longe vi parolis Esperanton kaj kiom longe vi estis membro de EAF?*

Mi trovis esperanton ĉe kapvorto "kiel-taito" (lingvoscio) en Taitokirja (enciklopedio de praktikaj konoj)

redaktita de Vilho Setälä kaj memlernis la elementojn en 1967–68. Baldaŭ trovinte librojn, radion kaj gazetojn – inter ili EF – min esperanto ĝisostigis en miaj gimnaziaj jaroj. Tiam mi aliĝis al UEA kaj EAF.

*Kion vi volas akcenti en agado de EAF? Kion novan vi volos doni al la agado? Kio estas bone en EAF nun kaj kiujn mankojn vi rimarkis?*

Organizaĵoj kaj movadoj kun aspiroj internacimaj sur egaleca bazo, kun celoj por homo sed ne por maljusto, estas niaj naturaj kunlaborantoj en nia laboro lingvo- kaj kulturpolitika. Inter ili ni meritas kaj prenas nian prestiĝon. Por tio ni daŭre fosas nian sulkon de instruado kaj esperantokulturo, kaj profundigas nian sulkon ekster Esperantujo partoprenante lingvopolitikajn kaj internacimajn diskutojn kun niaj starpunktoj – laŭte, elegante – jes, ĝin ni havas. Laŭte – ja nian voĉon ni povus laŭtigi, ĉar – kuraĝon ni ne devas ŝpari (kiel ni eble iam faris), ĉar nia afero estas ĝusta.

*Kiel kaj kie vi uzas Esperanton kun eksterlandanoj? Kiom ofte vi vizitas aliajn landojn? Ĉu vi povas kompari finnan Esperanto-agadon kun tiu de aliaj landoj?*

Plej multaj miaj eksterlandaj kontaktoj ja estas esperantaj, ĉiutagaj kaj skribe-retaj. Nuntempe ĉiujare du-trifoje mi partoprenas esperantajn

aranĝojn ankaŭ eksterlande, kaj kuraĝas diri, ke ni kompetentas, sed ankaŭ ke ni ne rajtas fieri.

*Ĉu vi ofte uzas eksterlande aliajn lingvojn ol Esperanton? Kiujn lingvojn, kie?*

Mi malpli ofte vojaĝas ne-esperante eksterlande, tiam mi uzas germanan kaj anglan, kaj svedan (foje "skandinave"). En neceso turisman francan, kaj pasintjare en la eksfinnlanda Karelio mi trovis min kompreniĝi en rudimenta rusa. Sed ĉefe mia bezono de kaj uzado de fremdlingvoj estas skriba, profesia, literatura.

*Ĉu vi pensas, ke Esperanto povus reale esti signifaj faktoro en internacia agado, kiel ekzemple EU, UN kaj diplomata vivo? Se jes, kiom longe vi pensas, ke daŭros ĝis tio povus realiĝi?*

Mi detenas min de prognozado. Esperanto estas valora faktoro en nia reala vivo kaj kulturo, ni vivas kaj produktas en ĝi kiel en ĝardeno. Ĝi ne estas helpa, sed ĉefa lingvo en sia rolo. Naciaj lingvoj uzataj internacie estas helplingvoj. Ili estas fabriko kaj oficejo. Ke esperanto povu iam esti en rolo de vera internacia lingvo de oficialaj organizaĵoj, postulas pozitivajn ŝanĝojn en la fabriko kaj oficejo. Tio estas io pli ol nia movado en la nuna momento povas defii. Kaj neniam sola.

*Kiom longe vi legis Esperanta Finnlandon? Kiom vi ŝatas ĝin? Ĉu vi kutimas legi ĉiujn artikolojn?*

Preskaŭ de la komenco, kiel mi rakontis: Trovis gazetojn. Ŝatas – ja ĝi edukis min, siaparte. Malofte restis io nelegita.

*Vi ja estis iam ĉefredaktoro, kiel vi perceptas la evoluon de la gazeto dum tempo de diversaj ĉefredaktoroj?*

Ni ĉiuj ĉiam faris nian plejbonon. ▷

*Kiel vi spertis vian propran ĉefredaktoran tempon? Kiajn ŝanĝojn vi vidas en farado de la gazeto nun (en komputika-interreta erao)?*

Mia tempo (1978–86) estis laŭvorte papera, ankaŭ tonda kaj glua. Gratulas min, ke pli sagacaj farantoj sin edukis al la nuna nova tekniko, kiu ja havas avantaĝojn kompare kun kompilado de paperaj originaloj por ofseta presado. La amatoreco de la gazeto estis tiam pli videbla...

*Kiel vi vidas estontecon de paperaj gazetoj en la interreta erao?*

En 1978–82 mi instruis la finnan, gepatran lingvon en politeknika lernejo, interalie al studentoj pri la paperproceza tekniko. En kurso pri amaskomunikado mi prognozis, ke “la sistemo Minitel en Francio estas nun en komenca fazo, sed ni spertos, ke en dek jaroj la malkreskanta bezono de papero ankaŭ vian metion influos.” Eble influis, sed ne malkreskige, kaj pasis tri jardekoj, kaj restas pliaj.

*Kion vi cetere faras en via vivo ekster Esperanto-agado? (profesio, familio, aliaj hobiaj...)*

Mi estas specialpedagogo, logopediisto, helpas en bazlernejo infanojn kun perturboj en lingva kaj intelekta evoluo – okupiĝas pri obstakloj de lernado. En mia labora municipo Laitila mi estas la sindikata delegito por akademaj kaj specialistaj laborantoj (Akava-Juko), kaj iom rolas en loka politiko en mia hejmurbo Rauma en la partio Maldekstra Alianco. Prefere vivstilo ol hobiaj estas loĝi en la fama malnova centro de la urbo, kie kreskis kaj jam delonge perdiĝis en Helsinko kaj la muzika mondo miaj tri gefiloj, ĉijare 23-, 28- kaj 33-jaraj. – Klasika kaj popola muziko, filmo kaj teatro staras al mi proksime, kaj la ceter’ – nur literaturo.

*(intervjuis mm)*

---

## Esperanton tulevaisuus: kirjoituskilpailu

Suomen opettajien esperantoyhdistys on päättänyt julistaa kieltenopettajille kirjoituskilpailun aiheesta ”Onko esperantolla tulevaisuutta?” Pääpalkintona on ilmainen osallistuminen esperanton kesäkursseille Valamosssa 22.–26.6.2009 (josta ks. [www.esperanto.fi/Valamosuomi.htm](http://www.esperanto.fi/Valamosuomi.htm) ja [www.valamo.fi](http://www.valamo.fi)).

Kirjoitelmat, pituudeltaan 1–3 liuskaa, saa laatia millä tahansa kielellä. Rajoituksena on vain se, että tekijän on oltava Suomessa työskentelevä oppilaalle vieraan kielen opettaja.

Lähetä kirjoituksesi toukokuun aikana Opettajien Esperantoliiton sihteerialle, joka toimittaa sen anonyyminä arviointilautakunnalle.

Osoite: Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85, 33500 TAMPERE; [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)

## Skribkonkurso pri estonteco de Esperanto

La instruista asocio ELFI anoncas konkurson por lingvoinstruistoj pri temo ”Ĉu ekzistas estonteco por Esperanto?” La unua premio estas senpaga partopreno en somera Esperanto-kurso en Valamo 22.–26.6.2009. La verkaĵojn de longeco da 1 ĝis 3 paĝoj oni rajtas skribi en kiu ajn lingvo, la sola kondiĉo estas, ke la verkanto estu instruisto de lingvo, kiu estas fremda por la lernanto, laboranta en Finnlando.

La tekston oni sendu en majo al Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85, 33500 TAMPERE, retroŝte [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)

## Siin Tallinn – Estona konferenco

La Konferenco de Esperanto-Asocio de Estonio okazis la 28-an de marto en Tallinn, kie la belaj salonoj de la "Instruista Domo" de kvardek jaroj gastigas ĉiusemajnajn kunvenojn de Tallinna klubo. Nun kunvenis apenaŭ trideko el kelkaj urboj kaj urbetoj, sed bedaŭrinde ne el Tartu, kiu skribe raportis pri la klubaj aktivecoj.

Estonoj foje memironiece konstatas, ke la movado ankaŭ ĉe ili modernigis kiel tuta socio – gejunuloj bezonas siajn fortojn en vivo materia kaj sin direktas ne al "idealismaĵ" movadoj kiel esperanto. Tiel nia movado "griziĝas kaj kriziĝas" (ĉu ne bonega ekzercado al ni ugroj pri sonoj siblaj kaj sonoraj). Ĉu ni estas tradicio malaperanta, klubo de restanta historio?

Ĉeestante la konferencon mi havis la ŝancon aŭskulti raportojn de kluboj kaj unuopaj aktivecoj, kaj laste ankaŭ mem doni nian saluton, raportoj, rakonti kaj reklami. Estonajn amikojn ni esperas renkonti somere en Valamo kaj septembre en Pori. Kaj ili bonvenigas nin en Pärnu, en 45-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 8.–12.7.2009 (aliĝilo aperis en EF 6/2008, kaj peti ĝin eblas ĉe retadreso [esperant@hot.ee](mailto:esperant@hot.ee)).


La seninterrompa tradicio de BET ne atestas pri malaperanta tradicio, male. Ankaŭ eldonaĵoj atestas pri forto kaj vivo: Aperas kvaronjare Informoj de EAE, en mia sako revene pezegis kun 810 paĝoj Esperanto-eesti sõnaraamat de Raimund Haabvere kaj kunlaborantoj, eldonita en 2004 de EAE, kaj brilis ĵus aperinta luksa volumo Estonio: lando, popolo, kulturo, esperanten tradukita kaj redaktita de dekdumembra teamo. Atingaĵoj, kiuj al ni dume mankas, malgraŭ niaj materie pli favoraj kondiĉoj.

Inter la aktivecoj ŝajnas esti nur malmultaj gejunuloj, sed ja diversaj generacioj. Tiuj generacioj ĉiuj estas junaj, ĉar ĉiu generacio estas la junularo de sia tempo. Tiuj junaj generacioj estis grava parto en la kerno de tiu internaciema sendependa aspiro, kiu en pasintaj jardekoj, organizante sin en movadoj kiel BET kaj SEJM, ebligis la nunan pli liberan staton. Tio estas rezulto de la idealismo kaj kuraĝo de junulaj generacioj, kaj novaj aperas, kiam mondo progresas kaj kuraĝon bezonas.

*Tuomo Grundström*



## Heikkoja signaaleja kaupallisesta esperantosta



Esperanton harrastajien joukossa on ihmisiä monilta eri ammattialoilta. Meihin liitetään kylä tiettyjä stereotypioita, että esimerkiksi olemme rationaalisia, tieteellisiä, ehkä hiljaisia ja vaatimattomia, luemme paljon ja että osaamme hyvin monia eri kieliä. Nämä stereotypiat ovat ehkä jossain määrin tosia, mutta mielestäni eivät niin paljon kuin esperantoliikkeen ulkopuolella luullaan. Esperanton harrastajissa törmää kyllä kaikenlaisiin ihmisiin, ja etenkin taiteellisiin ihmisiin yllättävän paljon. Yleinen käsitys esperantosta kankeana ja taiteellisiin tarkoituksiin taipumattomana kielenä ainakin on täysin väärä. Harrastajien keskuudessahan sanotaan, että vitsitkin ovat esperantoksi hausempia.

Tietyt ammatit ovat kyllä esperantonharrastajissa yliedustettuina. Väittäisin, vaikka tilastollista näyttöä en pysty väitteen tueksi esittämään, että opettajat, akateemiset tutkijat, erityisesti matemaatikot, ja tietokoneihmiset ovat esperanton harrastajia selvästi muita useammin. Ammattiryhmä, joka esperantosta näyttäisi melkein puuttuvan, ovat kaupallisen alan osaajat. Niinpä esperanto ei juuri ole löytänytään tietään kaupallisen yritystoiminnan käyttöön.

Esperantotapahtumissa vallitseekin yleensä varsin epäkaupallinen ilmapiiri. Tapahtumien osallistumismaksut ovat yleensä pieniä ja majoi- tusolosuhteet vaatimattomia, paikalla tapahtuva myyntitoiminta on vähäistä ja koostuu lähinnä kirjojen myynnistä, eikä niitäkään erityisemmin mainosteta. Järjestelyt ja turistikohteisiin opastamiset yleensä tehdään vapaaehtoistyön pohjalta. Esperanton harrastajat ovat ehkä asiantilaa tyytyväisiäkin, tarjoaahan esperanto tässä muodossa keinon matkustella ja tutustua eri kulttuureihin halvalla. Itsekin olen erittäin epäkaupallinen ihminen, olen aina rakentanut

hyvinvointini sen periaatteen varaan, että on minulle sitä parempi, mitä vähemmän rahaa liikkuu minun ja kaupallisten toimijoiden välillä. Ja kieltämättä minua viehättää esperantoksi julkaistavassa kirjallisuudessa se arkistojen hämyisyydeltä vivahtava ilmiö, että siinä niin usein palataan vuosikymmenien takaisin teksteihin uudestaan ja uudestaan, ja etenkin Zamenhofin jo 1800-luvulla kirjoittamia tekstejä analysoidaan tarkemmin kuin oikeastaan olisi tarpeellistakaan.

Kaikki tämä antaa esperantolle hyvin epäkaupallisen, jopa kaupallisuudenvastaisen leiman, suorastaan poliittisesti vasemmistolaisenkin. Enkä voi väittää, että vasemmistolaisuus ja esperanto eivät viihtyisi jossain määrin yhdessä, vaikka esperantoliikkeen sisältä katsottuna sen poliittinen vasemmistolaisuus on sentään huomattavasti vähäisempää kuin mitä jotkut esperantoliikkeen ulkopuoliset näyttävät luulevan. Olihan viime syksyn kunnallisvaaleissakin esperantonharrastajia ehdolla tasaisesti sekä oikeiston että vasemmiston eri puolueissa.

Esperanton harrastajien kesken vallitsee solidaarinen ilmapiiri. Harrastajat eri puolilla maailmaa tuntevat olevansa kuin yhtä suurta perhettä, heidän on helppoa luottaa toisiinsa jo ennen henkilökohtaista tutustumista, ja koska kukaan ei odota rikastuvansa esperanton avulla, ei juuri tarvitse pelätä myöskään tulevansa esperanton kautta hyväksi käytetyksi. Voi olla, että monista tuntuu myös epämiellyttävältä ajatella, että joku alkaisikin ansaita esperanton avulla rahaa. Mihin katoaisi tuttu ja turvallinen ympäristö, jossa (melkein) kaikki tapahtuu vilpittömän keskinäi-



*Vuonna 1959 lyötyjä esperantorahoja ”Stelo”*

sen vastavuoroisuuden ja hyvän olon mukaan, ilman hyötymistarkoituksia?

Tosiasia kuitenkin myös on, että esperanto tällä pohjalla pysyessään säilyykin pienenä ja vähämerkityksisenä ideana. Laajamittainen turismi tapahtuu kuitenkin kaupallisten matkatoimistojen ja liikenneyhtiöitten kautta, ja laajasti menestyvät kulttuurituotteet (kirjat, musiikki, elokuvat) myydään kaupallisia reittejä pitkin. Merkittäväksi tekijäksi esperanto voi nousta vasta silloin kun sen avulla toteutetaan myös kaupallisia tarkoituksia.

Esperantomaailmassa on toistaiseksi nähty vain heikkoja signaaleja yrityksistä käyttää esperantoa kaupallisiin tarkoituksiin. On joskus yritetty mm. ottaa käyttöön esperantomaailman oma raha, mutta sellaisista hankkeista ei ole tullut pysyvää konkretiaa. 1900-luvun alussa esperantotapahtumissa kyllä käytettiin *speso-*

nimistä rahayksikköä ja myöhemmin toisen maailmansodan jälkeen painettiin *stelo*-nimisiä esperantorahoja, mutta molemmat ovat sittemmin jääneet pois käytöstä.

Harvassa ovat myös ihmiset, jotka saavat palkkaa esperantoksi työskentelemisestä, vaikka heitäkin sentään on mm. Kansainvälisen esperantoliiton päämajassa Rotterdamissa ja Wienissä sijaitsevassa esperanton ja keinokielten museossa. Tässä lehdessä saamme lukea ranskalaisen Philippe Bérizzin kirjoittaman uutisen eräästä hankkeesta, jossa esperantosta pyritään tekemään kaupallisen yrityksen työkalua. Me epäkaupalliset ihmiset voimme vain toivoa, että nämäkin hankkeet johtavat johonkin – ja että maailmassa on samalla tilaa myös epäkaupallisuudelle.

*Mikko Mäkitalo*



## Ŝanĝo en la estraro

EAF dankas al Teuvo Alavillamo, kiu lasis vicestraranecon post dujara deĵoro kaj bonvenigas Arvo Karvinen, kiu transprenis la taskon.



## Esperanto inter blinduloj

Steletoj, asocio de blindaj esperantistoj fariĝas 90-jara ĉi jare. Okaze de festojaro Steleto sin prezentis dum Vinraj Tagoj de EAF en Kuusankoski (Kouvola) en la mezo de marto. Prelegoj kaj ekspozicio konatiĝis 50 partoprenantojn kun la esperanta movado inter viddifektitoj. Raimo Tanskanen, prezidanto de Steleto parolis pri la agado de Steleto kaj Arvo Karvinen pri la internacia kunlaboro de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj). Ĉefa preleganto de Vinraj Tagoj, Otto Prytz, membro de Esperanto Akademio prezentis tri prelegojn. Unue li parolis pri la brajla konferenco en Parizo okaze de brajla 200-naskiĝdatreveno de Louis Braille,

kreinto de brajla skribsistemo. En la konferenco li estis unu el la prelegantoj konataj en Esperantujo. En Kuusankoski li plue parolis pri la signifo de esperanto inter viddifektitoj kaj pri brajla skribo kaj ĝia evoluo, kiun ankaŭ esperantistoj influis. Brajla sistemo daŭre evoluas laŭ postuloj de sangiĝanta mondo.

Ekspozicio de Steleto enhavis brajlajn librojn kaj skribilojn. Riitta kaj Matti Ekola kaj Aatu Moilanen montris al interesuloj kiel oni uzas brajlan skribmaŝinon, tabulon kaj pinĉilon. Multaj kuraĝiĝis provi skribi kelkajn vortojn, sep eĉ donis bonege verkitan leteron al Aatu. Gratulon al ili! Tri partoprenantoj mendis tabu-



*Pilar Menéndez kaj Tiina Oittinen provas instali mikrofonon por Otto Prytz.*





*Otto Prytz legis palpante brajlan tekston.*



*Raimo Tanskanen prezentis sian prelegon parkere.*

### **Tri blindaj prelegantoj – tri diversaj prelegkutimoj**



*Arvo Karvinen aŭskultis surbendigitan tekston kaj samtempe parolis.*

lon kaj pinĉilon.

Ekspozicion kompletigis grandaj fotoj pri telefona centralo de viddifektita oficistino. Dankon al Terhi Laaksonen pro tio!

Fotoalbumoj provis doni imagon de la agado de Steleto; studrondo, internaciaj kongresoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj, kie steleto-anoj asistis.

Sabatvespere muzikemaj steleto-anoj gvidis komunan kantadon kaj triopo Aatu-Arvo-Raimo prezentis favoratajn kantojn. Kiel multaj scias, la triopo kune kantadas ekde lernejoj ja-roj en blindullernejoj. Tuomo Grundström gaje amuzis nin per esperantaj poemoj de Hjalmar Nortamo kaj gvidis kantadon. Bedaŭrinde tiuj kantoj ne haveblis brajle. Nova steleto-ano Matti Ekola asistis per akordiono.

*Ritva Sabelli*

## Zamenhofin vetoomus 1915

*Ludwik Zamenhof (1859–1917), ”Tohtori Esperanto”, joutui viimeisinä vuosinaan näkemään uuden ajan. Suursodan syttyminen keskeytti hänen matkansa esperanton maailmankongressiin Pariisiin ja peruutti koko kongressin (jolloin Zamenhof ainoan kerran kävi Suomessakin matkustaessaan Pohjanlahden ympäri takaisin keisarikuntaan). Yhdessä viimeisistä kirjoituksistaan hän hahmottaa kansainvälistä järjestystä, jota tarvitaan estämään seuraavat katastro-*

*fit. Tähänastisen historian tiedämme. Jotkut Zamenhofin näkemyksistä ovat ainakin jossain määrin ja jollain alueilla toteutuneet, toisia ”pragmaatitot” pitävät edelleen mahdottomuuksina. Miksi? Siitä onkin paikallaan keskustella.*

*Olen tähän lyhentänyt artikkelin Zamenhof-elämäkertaa varten tekemästäni käännöksestä.*

TG

### Suursodan jälkeen

(Vetoomus diplomaateille) 1915

Kun te kokoonnutte maailmanhistorian tähän asti tuhoisimman sodan jälkeen, teillä on edessänne poikkeuksellisen suuri ja tärkeä tehtävä. Alatteko te yksinkertaisesti uusia ja paikata Euroopan karttaa? Päättättekö yksikantaan, että maapalan A pitää kuulua heimolle X ja maapalan B heimolle Y? Joudutte sen kyllä tekemään, mutta se on vain vähäinen osa työstänne.

Antamalla jonkin alueen tälle tai tuolle kansalle te teette aina väärin niitä ihmisiä kohtaan, joilla on yhtäläinen luonnollinen oikeus samaan maahan. Ainoa todella oikeudenmukainen päätös, jonka voitte tehdä, on julistaa kaikkien Euroopan valtioitten viralliseksi, pitävästi sovituksi ja ehdottomaksi päätökseksi seuraavan luonnollisen, mutta tähän asti valitettavasti noudattamatta jääneen periaatteen:

*Jokainen maa kuuluu moraalisesti ja aineellisesti täysin tasapuolisesti kaikille asukkailleen.*

Parasta olisi, jos erikokoisten valtakuntien sijaan meillä joskus olisi alueellisesti ja tasapainoisesti muodostettu ”Euroopan Yhdysvallat”. Mutta jos on vielä liian aikaista puhua siitä, täytyy ainakin yllä kuvatun periaatteen yhteisellä ja virallisella hyväksymisellä poistaa

loputtomien taistelujen lähde: Maan ja heimon yhdistäminen.

Kun koko Euroopassa vallitsevat *absoluuttiset*, s.o. luonnolliset, kaikille yhtäläiset poliittiset oikeudet, kun jokaisen maan asukkaat ovat moraalisesti ja aineellisesti täysin tasa-arvoiset, kun maita ei nimetä kansanheimoille, kun hallintokielillä ei ole enää kansallis-shovinistista luonnetta, kun ei enää ole isäntäkansoja ja alistettuja kansoja – silloin ei enää ole heimosotien syytä; silloin jokainen ihminen voi kaikessa rauhassa elää luonnollisessa, todellisessa ja vilpittömästi rakastamassaan isänmaassa tarvitsematta pelätä jonkun ”ottavan” sitä häneltä ja tarvitsematta haaveilla muitten ihmisten isänmaan valloittamisesta.

Tiedän oikein hyvin, ettei kansojen välinen vihamielisyyys häviä *yhtäkkiä*, tekivät diplomaatit mitä tahansa. Mutta sen tavoitteen saavuttamiseksi työskentelevätkin sitten *yksityiset* henkilöt valistuksen, kasvatuksen, taivuttelun jne. keinoin; teiltä diplomaateilta me odotamme vain, että annatte meille siihen *mahdollisuuden*. Kansojen keskinäinen vihanpito ei ole mitenkään luonnollista. Vihaa ei synnytä vain vie-

raus ja väärinymmärrys – ne ovat kyllä helposti poistettavissa – vaan etenkin se, että on sortavia ja sorrettuja kansanheimoja: Edellisten sokea itsekkyyks, ylimielisyys ja syyttelevyys ja jälkimmäisten luonnollinen vastustus. On helppoa luoda veljeyttä tasa-arvoisten ihmisten välille, mutta mahdollonta saattaa veljiksi ihmisiä, joista yhdet pitävät itseään toisten itseoikeutettuina isäntinä.

Jos vaikkapa vain *poistaisitte maitten kansallisuusnimet* (mikä sinänsä on helppoa), tekisitte jotain poikkeuksellisen merkittävää, aloittaisitte Euroopan historian uuden jakson. Maassa, jonka nimi ei liitä sitä kansallisuuksiin, sen asukkaitten täysi tasavertaisuus toteutuu ehdottomasti ennemmin tai myöhemmin, kun taas kansallisesti nimetyssä maassa tasa-arvo ei koskaan voi olla täydellinen eikä pysyvä. Sellainen kovan onnen nimi näet ruokkii monikansallisten maitten sisäisiä kaunoja – eikä ainoastaan itäisen Euroopan monikansallisissa maissa, vaan sivistyneemmissäkin maissa se hämmentää vilpittömimpiäkin kansalaisia pitäen yllä sellaista näkemystä ja tuntumaa, että maa kuuluu tietynnimiselle kansalle, ja kaikki muut kansanheimot ovat siellä vain vieraita. Parhaalla tahdollaankaan sellaisen maan kansalaiset eivät voi tottua ajatukseen yhdestä kansakunnasta, koska kansakunnalle *ei ole sanaa, nimeä*. Kysyttäessä, mihin kuulut, kansalaisen on *pakko* mainita jokin *kansanheimo*. Sellainen pysyvä pakko määritellä itsensä kansallisuuden eikä yhteisen kansakunnan kautta on omiaan vahvistamaan kansalliskiihkoista kyräilyä asukkaiden kesken.

Lyhyesti kerraten: Kun diplomaatit sodan päätyttyä kokoontuvat, he voivat muuttaa Euroopan karttaa, mutta sen ei pidä olla heidän *päätehtävänsä*. Sen tulee olla osapuulleen seuraavanlaisten lakien säätäminen hallitusten nimissä ja niitten takauksin:

1. Jokainen valtakunta kuuluu moraalisesti ja aineellisesti kaikille asukkaalleen riippumatta

näiden kielestä, uskonnonsta tai oletetusta alkuperästä. Valtakunnan millään kansanheimolla ei saa olla suurempia tai vähäisempiä oikeuksia tai velvollisuuksia kuin toisilla.

2. Valtakunnan jokaisella asukkaalla on oikeus omaan äidinkieleensä tai murteeseensa ja omaan uskontoonsa. Vain kaikille kansallisuuksille tarkoitetuissa julkisissa laitoksissa on käytettävä valtakunnan asukkaiden yhteisellä sopimuksella käyttöön ottamaa hallintokieltä. Niissä julkisissa laitoksissa, joilla on erityinen paikallisuusluonne, voi yhteisen hallintokielen sijasta käyttää muutakin kieltä, jos vähintään 90% paikallisista asukkaista antaa siihen suostumuksensa. Valtakunnallista tai paikallista hallintokieltä ei ole pidettävä nöyryyttävänä alamaisuutena, vaan vähemmistön vapaaehtoisena käytännöllisenä vastaantulona.

3. Valtakuntien hallitukset vastaavat alueellaan esiintyvistä epäoikeudenmukaisuuksista Euroopan pysyvälle tuomioistuimelle, jonka perustavat yhteisesti Euroopan kaikki valtakunnat.

4. Jokaisella valtakunnalla ja maakunnalla on nimi, joka ei viittaa kansallisuuteen, vaan on puolueettomasti maantieteellinen. Nimet hyväksytään kaikkien valtioiden yhteisellä sopimuksella.

Herrat diplomaatit! Eurooppa odottaa teiltä rauhaa, kun päättyy tämä hirvittävä tuhoamisota, joka on vaivuttanut ihmiskunnan petoeläimiä alemmas. Se ei odota tilapäistä tyyntä kautta, vaan pysyvää rauhaa, joka sopii sivistyneelle ihmiskunnalle. Mutta muistakaa, muistakaa, muistakaa, että ainoa keino sellaisen rauhahan saavuttamiseksi on poistaa kerta kaikkiaan sotien *alkusyy*, muinaisten raakalaisaikojen barbaarinen jäännös, *kansanheimojen toisiinsa kohdistama ylivalta*.

L.L.Zamenhof

## La freneza veto de Triballat

Olivier Clanchin, prezidanto de firmao-grupo Triballat, volas igi Esperanton lingvo de la komerco. Li nuntempe eksperimentas la projekton kun siaj teamoj.

Ni ĝin jam anoncis (februara numero de "Le Journal des Entreprises"), Olivier Clanchin preparas operacion aparte originalan kaj iel premieran. La estro de la grupo Triballat, en la urbo Noyal-sur-Vilaine, akiris komence de la nuna jaro malgrandan italan entreprenon. Famkonatas pri ĉiuj eksterlandaj aĉetoj: la plej malfacila parto estas "agordi la violonojn" (kio, en la franca, signifas: harmonie kunlaborigi la homojn) inter ambaŭ malsamkulturaj organizoj. Kaj ĉar la angla ne estas tiom evidenta por la francoj kaj la italoj, Olivier Clanchin lanĉas frenezan defion, ke iuj el liaj dungitoj povos komuniki kun la itala teamo en... Esperanto!

La bretona industriestro asociiĝis kun Daniel Jouan (komunikisto en urbo Rennes), Jean-Marc Léveque (la respondeculo pri daŭrigopovo ĉe Triballat) kaj Philippe Bérizzi (estro de la tradukagentejo LinguaForce en Rennes) por krei la asocion "Entreprise Esperanto". Kio estas la principo? Temas pri starigi profesion trejnigon

per fulminstruo al la bretonaj kaj italaj teamoj, por ke ili lernu la universalan "profesiecan" lingvon, precizigas Philippe Bérizzi, homo kiu lernas Esperanton de dudek jaroj.

"La trejnado okazos dum dufoje kvin tagoj kun tri francoj kaj tri italoj. La celo estas ke ili kapablu paroli, sin prezenti, organizi rendevuojn, kaj sekve labori kune." – Tiujn fulmkursojn kreis Philippe Bérizzi mem. "Mi jam testis ĝin kun individuoj, kaj tio ne malbone funkcias". Por Triballat kaj ties nova filio Integralimenti, okazos sesio en Francio kaj alia en Italio. Je kiu buĝeto? Po 200 eŭroj tage por ĉiu lernanto.

Per tiu eksperimento, promociantoj de la projekto celas demonstri ke eblas, danke al Esperanto, starigi ene de kompanioj internaciajn teamojn. Ĉar laŭ iu esploro "Esperanton oni lernas dekfoje pli rapide ol la anglan, indikas la estro de LinguaForce. Konkrete, tio do signifas malpli altajn trejnkostojn." Rezultojn de la eksperimento, oni vidos en la venontaj monatoj.

*Artikolo kaj teksto en [www.linguaforce.com/presse](http://www.linguaforce.com/presse). Journal des entreprises – Ille et Vilaine – marto 2009 (esperantigo de la artikolo). inf: Philippe Bérizzi*

## Azio legende-leginde en Juna amiko 2009/1

La unua numero de Juna amiko por 2009 proponos buntan kaj tutmondan enhavon. Azio forte kontribuis: troveblas fableca legendo el la montega lando Nepalo, anekdotoj el la granda Bharato (Hindio), aventura rakonto pri pli granda Ĉinio (verkita de ĉeĥo kaj sendita de germano) kaj legendo el Vjetnamio. Aldoniĝas tradukoj el Kubo – legendo kaj teatraĵeto. Aperos plie kvizo, la bildstrio pri la aventuroj de la vojaĝantaj instruistoj Emilo kaj Erni, artikolo Ĉu vi scias

ke... kaj la kutima rubriko pri lernejoj projektoj kaj movadaj eroj (Verda Paĝo kaj Lingva Doktoro). La rubriko por etuloj, LUME, prezentas teatraĵeton kaj ege simplan krucenigmon pri familioj. Humuro figuras en formo de pluraj ŝercoj, kaj en amuzaj poemo kaj skeĉo pri la freneziga flanko de ret-babilado. En la mezaj paĝoj ni esploras ideojn kiujn oni povas ligi al la koloro verda.

Perantoj en trideko da landoj akceptas abonojn: nun estas la ĝusta momento por agi, por ke vi ricevu la unuan numeron por la jaro en aprilo. ▷

## Valoro kaj graveco de minoritata lingvo

La lingvo estas ne nur ilo por informado sed ĝi enhavas la ĉefajn elementojn de la (landa, regiona, loka) kulturo. Ekzemple, samea lingvo estas mapo pri samea realo. Ankaŭ al alilingvano, kiu lernas ĝin, ĝi malfermos vojon al komprenado de samea kulturo. La vorton "samea" vi rajtas ŝanĝi en iun alian priskribantan minoritatan homgrupon.

La lingvo de la homo direktiĝas al praktiko. Ĝi evoluigas esprimojn por la bezonoj de sia kulturo, precipe en la fakoj, kiuj gravas ĝuste en ĝi. La samea enhavas multegajn vortojn por priskribi la terenon, topografion: pli ol cent vortojn por priskribi altaĵojn, 40 vortojn pri ebenaĵoj, 60 vortojn pri kav(et)oj kaj val(et)oj. Duonmilo da vortoj priskribas variajn boacojn, ties ramuron, koloron, aĝon. Cento da vortoj rakontas pri la kvalitoj de la neĝo, kaj surbaze de tio sciencistoj evoluas terminaron por internacia uzo. Ni ne povas esperi, ke ĉio tio estus facile esprimebla en la finna aŭ en Esperanto. Ni bezonus tutajn frazojn kaj multon da elpensemo por rakonti arktan realon en pli suda lingvo.

Demandite kial sameaj verkistoj verkas en sia minoritata lingvo ili respondis:

– gepatra lingvo al homo estas kiel horizonta linio, per kiu li orientiĝas, konatigas kun sia ĉirkaŭaĵo;

– aliaj homoj konsideras nin periferuloj, sed ni mem sentas, ke ni estas en la centro...kaj pri

tio ni deziras rakonti al la aliaj;

– mia lingvo estas sango en mia vejnoj;

– per poemoj mi malstreĉas la ŝnurojn, kiuj ligas kaj premas mian menson, kaj mi forbalaas rubojn el mia animo;

– mi dubas, suspektas kaj restas alerta, mi volas ĝeni la regantojn;

– samea lingvo enhavas multajn konsilojn pri vivo en arktaj kondiĉoj;

– la donaco de nia literaturo al eksteruloj estas la samea mondo, la vivo en harmonio kun la arka naturo; miljara saĝo, malperforto.

La lingvo de miliardoj da homoj estas nur unu lingvo, unu realo: ĝi naĝas unudirekten kiel haringaro. La lingvo de malgranda popolo estas kiel vulpido, kiun la grego ne ŝirmas. Ĝi devas mem gvati kaj aŭskulti por eviti la danĝerojn. Ĝi rigardas ĉirkaŭen kaj atentis pri la aliaj, majoritataj popolanaroj, kiuj jam preskaŭ perdis siajn sciojn pri transvivado, povas multon lerni de vulpidoj. Kia estas la realo, kiun Esperanto priskribas? Kiaj la konsiloj, kiujn Esperanto donas? Ĉu ankaŭ ĝi enhavas la ĝermon de transvivado en la ŝanĝiĝanta mondo?

*Saliko*

*(libere laŭ libro Saamelaiset de Veli-Pekka Lehtola; parto el mia prelego La sorto de la ununura indiĝena popolo de Eŭropo)*

La revuo aperas trifoje jare kun 52 paĝoj. Jarabono kostas 14 eŭrojn en la tiel-nomataj 'A-landoj' kaj 9 eŭrojn en 'B-landoj'. Ni ofertas rabatojn por abonoj por ekde tri ekzempleroj sendendaj al unu adreso – ideala por lernejoj aŭ klubaj grupanoj.

Vizitu <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)> aŭ <[www.lernu.net](http://www.lernu.net)> kaj iru al la biblioteko, kie vi trovos nin inter la revuoj.

Peranto:

Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85,  
33400 TAMPERE. Tel. 050 321 4313.



## 100-jara datreveno de Ivo Lapenna

Ivo Lapenna (1909–1987) estis ĝenerala sekretario de UEA 1955–1964 kaj ĝia prezidanto 1964–1974. Li havas meriton pro la internacia rekono de Esperanto ĉe la asembleo de Unesko en 1954 en Montevideo.

Ivo Lapenna naskiĝis en Split (Dalmatio, Kroatio) la 5-an de novembro en 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. Lia vivo estis plene kunligita al la Esperanto-ideo kaj movado.

Li memlernis Esperanton en 1928. Li estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937–1950; komitatano kaj estrarano de Internacia Esperanto-Ligo (ekde 1947 UEA) ekde 1938. Li fondis Internacian Esperanto-Asociacion de Juristoj (IEAJ) en 1957 kaj estis ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ĝia organo Internacia Jura



*Ivo Lapenna, 5.11.1909–  
15.12.1987 (Foto: Torben Kehlet)*

Revuo. Li estis membro de Akademio de Esperanto ekde 1952. Li kunfondis ICNEM, Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado en 1980 kaj estis ĝia prezidanto kaj kunredaktis ĝian organon Horizonto.

Liaj biografio kaj verkoj estas kolektitaj en aparta retejo <http://www.ivolapenna.org>

---

## Kultura Esperanto-Festivalo

Kultura Esperanto-Festivalo denove okazos en Danio, en ĉarmega urbo de Hamlet: Helsingør/Elsinoro. La datoj estas de la 7a ĝis la 12a de julio 2009. Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturan Esperanto-Festivalon, ĝis nun ĝi estis organizita en Svedio, Finnlando kaj Danio. Ĝi estas festivalo kiu prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon.

KEF estas la loko kie Esperantoartistoj povas renkonti aliajn artistojn kaj kie oni povas interkonektiĝi kun la plureca vivo de la Esperanto-kulturo kiel spektanto de la multaj koncertoj,

teatraĵoj, kaj literaturaj prezentoj. Oni ankaŭ povas partopreni aktive en la multaj metiejoj, interalie lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron, legi kaj fari komiksojn, ludi ludojn en Esperanto, kaj ekz. karaokeo-kanti en Esperanto, vivante kun la artistoj mem. Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj distros: Ĵomart kaj Natasha, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj Inicials D.C., kaj pli da artistoj anoncotaj en la TTT-paĝo.

Oni loĝos primitive kaj tiamaniere la kosto ne estas tiel altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi pli lukse en migrulhejmo

## Virintagaj salutoj atingadas Japanion

*Ĉiujare japaninoj petas teksteton pri la graveco de nemilitemo por la Virina Tago. Laŭ ilia statistiko (sube) kvar finn(in)oj sendis. (Permesataj ankaŭ al viroj sendi.)*

Kun koraj dankoj pro via mesaĝo ni raportas al vi pri la Tago, la 8an, marto. La Internacia Virina Tago de UN en Hirosima ricevis sume 271 solidarecajn mesaĝojn el 69 landoj tutmonde. Dum unu semajno antaŭ la Tago ni havis ĉe urba Centro de Virina Edukado ekspozicion de la mesaĝoj, kaj la 8an en la kunveno de la Virina Tago ĉe urba Kultura Centro saman ekspozicion kun 300 vizitantoj. En malfermo de la kunveno de la Virina Tago antaŭ 200 virinaj aktivuloj el 20 organizoj s-ino OSIOKA Taeko raportis pri la internacia interŝanĝo de la mesaĝoj per Esperanto, kaj voĉlegis kvin el la mesaĝoj.

Pri la evento du avantaĝaj ĵurnaloj informis, aparte menciis pri la mesaĝoj "interŝanĝitaj per Esperanto."

La aktivulinoj aplaudis/-as laboron de ni Esperantistoj. Jen, la rezulto de la interŝanĝo de mesaĝoj:

Azio: Barato 2/ Ĉinio 6/ Israelo 4/ Irano 1/ Koreio 4/ Nepalo 2/ Pakistano 2/ Taĝikio 1/ Uzbekio 1/ Vjetnamio 2.

Afriko: Benino 1/ Konga Respubliko 2/ Malio 1/ Madagaskaro 1/ Niĝerio 1/ Sudafriko 1/ Tanzanio 2/ Togolando 1.

Oceanio: Aŭstralio 3/ Novzelando 1.

Mez-suda ameriko: Argentino 1/ Brazilo 10/ Ĉilio 1/ Ekvadoro 1/ Gvatemalo 2/ Kolombio 1/ Kostariko 1/ Kubo 3/ Meksiko 2/ Paragvajo 1/ Salvadoro 1/ Urugvajo 1/ Venezuelo 1.

Nordameriko: Usono 5/ Kanado 3.

Eŭropo: Albanio 2/ Armenio 2/ Aŭstrio 3/ Belgio 17/ Britio 3/ Bulgario 5/ Ĉeĥio 4/ Danio 1/ Estonio 2/ Finnlando 4/ Francio 62/ Germanio 14/ Grekio 1/ Hispanio 6/ Hungario 10/ Irlando 1/ Islando 2/ Italio 15/ Kroatio 1/ Latvio 1/ Litovio 1/ Luksemburgio 1/ Malto 1/ Nederlando 5/ Norvegio 1/ Pollando 6/ Portugalio 1/ Rumanio 2/ Rusio 7/ Serbio 3/ Slovenio 2/ Svedio 5/ Svisio 4/ Ukrainio 3.

*S-ino OSIOKA Tiekō*

*Vicprezidantino de komitato de la Internacia*

*Virina Tago Hirosima*

*Kontaktopersono: osioka@mail.goo.ne.jp*

aŭ en hotelo por al-dona kosto.

En la semajno tuj antaŭ KEF en Danio okazas la plej granda Rokfestivalo en Nordeŭropo – Roskilde Festivalo. La dana junularo organizos senpagan esperantan renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboras 24 horoj je la DEJO-budo, en 3 okhoraj periodoj.

Vidu ĉe [www.kef.saluton.dk](http://www.kef.saluton.dk) pri pli da detaloj, la diversaj metiejoj kaj kotizo.



## Steleto-aktivulo videblos en televido

Konata el blindula Esperanto-asocio Arvo Karvinen aperos kun sia samlerneĵano Ristomatti Ratia (Liikemiesten kauppaopisto) en la finna televido: Programo Kohtauspaikka elsendiĝos en kanalo YLE TV2 dimanĉe 19.4. je 18.20, lunde 20.4. je 20.20 kaj mer. 22.4. je 15.10.

Sokeitten esperantoyhdistyksestä tuttu Arvo Karvinen on nähtävissä televisiossa: YLE TV2: ssa esitetään Kohtauspaikka: Luokkakuva, Ristomatti Ratia ja Arvo Karvinen su 19.4.2009 klo 18.20, uusinnat ma 20.4. klo 20.20 ja ke 22.4. klo 15.10.

*informis Ritva Sabelli*

### Statistikeroj de UEA

En 2008 UEA registris la plej malgrandan nombron de individuaj membroj (IM) post la Dua Mondmilito: 5702, t.e. je 11 malpli ol la antaŭa malrekordo el 2002 kaj je 309 malpli ol en 2007. Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kiu pro la Jokohama UK estis la plej granda lando laŭ la nombro de IM en 2007, entute 856, sed en 2008 ĝi falis al 402. La perdo en Japanio estis do 454. Ĉar la tuta perdo estis 309, la cetera mondo kompensis do unu trionon de perdo en Japanio. Francio rekonkeris la unuan lokon kun 583 IM (+35); la dua estis Germanio kun 534 IM (+20). Finnlando per 136 membroj estas la dekdua.

La tuta membraro de UEA tamen kreskis per 706, ĉar la aligitaj membroj (AM) plimultiĝis el 11477 al 12492, dank' al Hungario, kiu en 2007 pagis por 100 AM sed en 2008 por 1348. (AM

estas tiuj anoj de la landaj asocioj, kiuj ne estas IM de UEA.) Pozitiva estis la kresko de Societo Zamenhof al 166 anoj (+39). Revuo "Esperanto" havis 3860 pagitajn abonojn (-157) kaj "Kontakto" 845 (+100).

*(el komuniko de UEA redaktis mm)*

### Aperis nepala- Esperanta vortaro

"Mi havas hodiaŭ historian novaĵon: Nepala Esperanto-Asocio sukcesis eldoni la Nepali-Esperanto-Vortaron. Estas laboro de 16 jaroj kaj redaktado de 15 monatoj.

Mi kredas ke vi vidos ĝin dum la venonta UK en Bjalistoko."

*Sincere salutas,  
Razeno Manandhar,  
Kathmandu, Nepalo*

### Heta Kesälä 1934–2009

S-ino Heta Kesälä forpasis post longa malsano la 14-an de februaro en Tuusula (Finnlando). Ŝi lernis Esperanton kiel devigan fakon en la fama lernejo de Somero, kie, jam post ŝia lerneja tempo, okazis oficiala eksperimento pri la instruado de Esperanto. Kesälä ekaktivis movade post la 54-a UK en Helsinko (1969). De post tiam ŝi partoprenis preskaŭ ĉiun UK ĝis ŝia malsaniĝo, laste en Vilno en 2005, kie ŝi fariĝis Honora Membro de UEA. Longtempe ŝi servis en diversaj funkcioj en la Esperanto-Klubo de Helsinko. De 1973 ĝis 1995 ŝi estis estrarano de Esperanto-Asocio de Finnlando, kies honora membro ŝi fariĝis en 2005.

Ekde 1975 ŝi estis delegito de UEA kaj ekde 1976 fakdelegito pri komputiloj kaj turismo. Ŝi estis vicprezidanto de LKK de



la 80-a UK en Tampere en 1995. En Societo Zamenhof ŝi membris preskaŭ ekde ĝia fondo. Same kiel iam ŝia instruisto Joel Vilkki, Heta Kesälä estis ĉefdelegito kaj kotizperanto de UEA de 1990 ĝis 2005.



## Valamo 22.-26.6.2009

La jubilea 10-a esperantokurso en la Popola instituto de Valamo, Heinävesi allogis ĝis nun dekon da partoprenantoj, kiuj venos kaj el Finnlando kaj el eksterlande. Krom festaj aliĝoj ni ricevis ankaŭ multajn demandojn de eblaj kursanoj. Estus bone havu iom pli da aliĝoj, sed jam nun ni povas anonci, ke la kurso tre verŝajne realiĝos. Kiel dum antaŭaj jaroj eblas ankaŭ vizito en Valamo dum la du lastaj kursotagoj kaj partopreno jaŭde en festa vespero. Se vi interesiĝas, bonvolu aliĝi tuj. Kontakto aŭ rekte al Valamo (se vi scipovas la finnan) aŭ tra Tiina Oittinen, la kursogvidanto (vidu p. 2). Kurso-programo kaj aliaj informoj videblaj en [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi).

★

Näyttää siltä, että Valamon kurssiviikko voidaan järjestää tänäkin vuonna. Ilmoittautuneita on tähän mennessä kymmenkunta. Sinä joka haluat mukaan, ota yhteyttä joko suoraan Valamoon tai ilmoittaudu kurssivastaavan, liiton sihteerin Tiina Oittisen kautta. Muista myös mahdollisuus kurssivierailuun ja osallistumiseen torstai-  
na kurssin juhlavaan päätösillalliseen.

Yhteystiedot Valamoon: Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo, puhelinmyyntipalveluun (017) 570 1810, sähköposti:

[opisto@valamo.fi](mailto:opisto@valamo.fi). Liiton nettisivuilla [www.esperanto.fi/kalenteri](http://www.esperanto.fi/kalenteri) on nähtävissä kurssiviikon ohjelma ja muuta tietoa Valamosta sekä linkki Valamon sivulle [www.valamo.fi](http://www.valamo.fi).

### Ekskurso al Valamo de Ladogo 27.-28.6. – aliĝu tuj

En EF 1/2009 troviĝis informoj pri semajnfina ekskursiva vojaĝo al la insulo Valamo sur la lago Ladogo, Rusio, kie hodiaŭ denove funkcias monaĥejo. Tiuj kiuj deziras partopreni la vojaĝon, bonvolu aliĝi tuj al Tiina Oittinen (kontaktinformoj sur p. 2). Necesas vizoj por la vizito kaj ilia mendo postulas kelkajn semajnojn.

### Ilmoittaudu heti Laatokan Valamon retkelle 27.-28.6.

Edellisessä Esperantolehdessä 2/2009 oli tarkemmat tiedot kurssin päätteeksi suunnitellusta retkestä Laatokan Valamoon. Ilmoittaudu heti Tiina Oittiselle (yhteystiedot lehden sivulla 2, lisäksi puh. 050-5494709), jos haluat mukaan. Ryhmäviisumin hakeminen vie useamman viikon. Voimme liittyä matkatoimiston kyseisenä viikonloppuna järjestämään Laatokan Valamon matkaan, vaikka meitä olisi lähdössä pienempikin ryhmä.



*Valamo de Ladogo (foto Sergej Bykov).*

## Per propra aŭto al Bjalistoko

Por tiuj, kiuj kutimas veturi per propra aŭto, la plej simpla maniero vojaĝi al UK en Bjalistoko estas veturado per propra aŭto. Ofte homoj timas, ke la vojo estas komplika, en malbona stato kaj ŝtelistoj abundas. Laŭ mia ses-jara sperto, mi kuraĝas konsili veturon per propra aŭto, speciale per person-aŭtomobilo.

Dum somero multaj ŝipoj trafikis el Helsinki al Talino. Oni povas elekti konvenajn tempon, prezon kaj transportilon. Mia favorita maniero estas veturi per malfrua ŝipo tranoktante en ŝipo. Je la 7-a mateno devas forveturi el ŝipo kaj komenci la veturadon tra la Baltaj landoj. Dum la sama tago eblos atingi Pollandon, eĉ Bjalistokon. Ĉio dependas el volo kaj fortoj de la kondukisto. Dua alternativo estas vojaĝi per taga aŭ posttagmeza ŝipo kaj tranokti malmultekoste en Pärnu en Estonio, jam proksime al la Latvia limo. Fakte en praktiko limoj ne plu ekzistas. Oni povas senhalte veturi el Estonio al Pollando. Nur, se oni uzas alian aŭton ol person-aŭton, oni devas pagi vojo-pagon ĉe Litovia limo.

Vojoj estas en ege bona stato ĝenerale. Unu iomete komplika, malnova vojo estas la vojo ĉirkaŭanta la urbon Rigo. La vojo estas praktika, ĉar uzante ĝin eblas tute eviti veturon al la urbo, sed la vojo estas parte en malbona stato, tamen bone signita por atentema kondukisto. Dua malbona loko estas tute proksime al Bjalistoko, ĉar tie oni konstruas novan aŭtostradon.

Utilas alveni al Talino kun preskaŭ malplena benzino, ĉar en Estonio (kaj ankaŭ en Litvio kaj Litovio) benzino kostas rimarkinde malpli ol en Finnlando. Plej praktike eblas tanki en benzinstacioj de Neste per visa-karto. Ĉe la aŭtomatoj eblas eĉ elekti la finnan lingvon. Du stacioj de Neste situas en Talino apud la vojo al Pärnu, la sekva apudvojo en Pärnu. Kelkaj stacioj de Neste situas apud Via Baltica ankaŭ en Litvio kaj Litovio. Utilas tanki antaŭ la limo

de Pollando, ĉar poste apud vojo ne plu estos. Neste kaj benzino ankaŭ kostas pli en Pollando. En Pollando kutimas esti garditaj parkejoj kaj plej sekure estas pagi por eviti ŝtelistojn. Ekz. en Bjalistoko certe ĉiuj hoteloj havas garditan parkejon, ofte senpagan.

En la Baltaj landoj trafiko ne estas tre vigla, tamen oni ofte neglektas la regulojn. Tamen veturante laŭ reguloj kaj rapideco-limigoj eblas eviti policistojn, kiuj ne mankas sur vojoj. Speciale en Litovio kaj en Pollando abundas kamionoj. Plej prudente estas permesi ilin veturi laŭ sia propra stilo.

Laŭ mia opinio veturo per propra aŭto estas la plej malmultekosta maniero vojaĝi al Bjalistoko, speciale se en la aŭto sidas 3-4 personoj. Do, se vi cerbumas, kiumaniere veturi al Bjalistoko, ne forgesu vian propran aŭton! Se vi deziras laŭspertajn pli detalajn informojn, mi volonte konsilos.

*Arja Kuhanen  
arja.kuhanen@netti.fi*

---

## Eventokalendaro de EAF

### 2009

- 23.5.2009 Printempa ekskurso (Esperanto-klubo de Jyväskylä)
- 22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo
- 25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando
- 19.-20.9.2009 Aŭtunaj Tagoj en Pori
- Decembre aranĝoj lige al Zamenhofa tago

### Laborkunsidoj

- 18.4.2009 Estraro

## Satakunta sin prezentas

Aŭtunaj Tagoj okazos en Pori, ĉe la plej larĝa parto de Botnia Golfo (nomata finne Selkämeri tradukebla ”granda, vasta, alta maro) en (sud) okcidenta Finnlando. Ĝi estas la ĉefa kaj plej granda urbo de la provinco Satakunta. Al la jusaj Vintraj Tagoj venis kvar Satakunta-anoj, po du el Raŭmo kaj Pori (grave estas ke ekvilibre, pro la tradicia, ne ĉiurilate tro serioza rivaleco de la du urboj). Ili renkontiĝis en tria grava centro de la provinco, Huittinen, por kune pluveturi aŭtomobile al Kouvola. (Parenteze, ankaŭ Kouvola kaj Raŭma ĝuste nun grave rivalas: Baldaŭ oni solvos ĉu estos konstruita fabriko de biologia dizelaĵo el ligno en unu el tiuj du urboj.)

Ĉiu urbo kaj vilaĝo havas sian famulon en la popola tradicio, homon kiun oni rememoras kaj proverbece mencias. Ne gravas ĉu tia famulo iam vere vivis, ĉu estas historia persono aŭ ne. Fikcio pli efikan tradicion kreas ol fakta historio – almenaŭ tiel alispecan, ke ni povas iom pli rideti.

La Huittinen-anoj certe estas tre prudentaj homoj. La Satakunta-saĝuloj tamen tute frenezan homon havas kiel sian popoltradician manekenon: La lertaj kaj laboremaj ŝparemuloj en la prospera urbo Huittinen donacis al ni proverbecan difinon pri malŝparado. Kiel evitindan ekzemplon?

Sed estas ja aferoj, pri kiuj ne necesas ŝpari nek avari. Tio estas ekzemple la vorto, kiam ni provas diversmaniere esprimi ideon. Propraĵo de la homa lingvo estas, ke principe esprimo de ĉiu ideo estas ebla en sennombraj, senfinaj variantoj enkadre de unuopa lingvo. Nia lingvo ne estas escepto, kaj por provi, ni variumis kun la simpata viro el Huittinen: “*Hullu mies Huittisista, syö enemmän kuin tienaa.*” Jen specimenoj:

*Freneza vir’ el Huittinen  
vivas en eksceso. Jen:*

*Manĝas pli ol perlaboras,  
tutan sian havon voras.*

*Ulo el Huittinen perdis prudenton:  
Ĉion formangis, aŭdigas lamenton.*

*Huittinen-ano, li eĉ sen ebrio  
tiel diboĉis, ke nun mankas ĉio.*

*Kion vi faris en Huittinen, homo?  
Ĉion formangis, ne restis eĉ pomolo!*

*La Huittinen-ano en stato tumulta:  
Ĉion formangis la homo plenstulta.*

*La viro el Huittinen tute freneza:  
Ĉia konsumo konstante ekscesa!*

(Al niaj eksterlandaj amikoj: Akcento sur la unua silabo, *ui* diftonge: *huittinen*. – Ĉu en via lando kaj popoltradicio troviĝas simila ulo? Lasu nin scii, ni sciigos la Huittinen-anojn...)

*Tuomo Grundström*

### Kevätretki Isojärven kansallispuistoon lauantaina 23.5.

Jyväskylän Esperantokerho kutsuu esperanton kielen ystäviä mukaan perinteiselle kevätretkelle. Tällä kertaa kohteena on Isojärven kansallispuisto Kuhmoisissa.

**Kokoontuminen** kansallispuiston opastuspisteessä Heretyn kämpällä klo 11.00. Päivän aikana vaellamme max. 8 km vaihtelevassa maastossa, lyhyempiäkin reittejä löytyy. Tarkistamme samalla, vieläkö majavat rakentavat patojaan ja onko kuikkaperhe jo palannut kotijärvelle. Eväät nautitaan nuotiotulilla ja muistellaan Tampereen kongressin yöretken sattumuksia. Ota jalkaan tukevat kengät ja reppuun juomaa ja evästä. **Ilmoittautumiset ja ajo-ohjeet** Seija Kettuselta, p. 040 867 2743, [seija.kettunen@pp5.inet.fi](mailto:seija.kettunen@pp5.inet.fi)

## Utila estas aliĝo

En 2008 Universala Esperanto-Asocio celebris sian centjariĝon multmaniere kaj okulfrape. Al mi nia organizaĵo similas oceanan ŝipon, kiu krozadas al ĉiuj direktoj: norden kaj suden, orienten kaj okcidenten. La historiisto Ulrich Lins interese prezentas nian komunan ŝipon en la verko "Utila estas aliĝo". Temas pri la ekestado, konstruado, ekipaĵaro kaj funkciado de nia movada floto sub la nomo UEA. Kvankam mi proksimume kvindek jarojn navigis kune kun talentaj stiristoj, malmulton mi ĝis nun sciis pri la pasintaj tagoj kaj pri gravaj notoj en la ŝipa taglibro.

Trafe kaj koncize la verkisto malfermas fenestron al la historio de nia movado en la kadroj de Universala Esperanto-Asocio. Tra du gravaj personecoj li kapablas alloge ilustrati esencajn trajtojn en la fazoj de la organizita agado. La ĉefaj kolonoj kompreneble estas Hector Hodler kaj Ivo Lapenna. Ne mankas koloraj detaloj. Por nefakuloj kaj ordinaraj esperantistoj la 126-paĝa eldonaĵo servas kiel efika gvidilo tra la pasintaj cent jaroj. Riĉe ilustrita libro prezentas unikajn fotojn, kiujn oni malfacile trovas aliloke. Ĝuste trafe elektitaj bildoj spicas la legemon kaj nutras la scivolon de la leganto.

La sidejo de UEA ekfunkciis en Svislando, poste trovis por si lokon en Britujo kaj nun agadas en Nederlando. Longa kaj kelkfoje ankaŭ tre ŝtorma estis la navigado de la asocia ŝipo de unu haveno al alia. Talentaj stiristoj sukcesis eviti subakvajn rokojn kaj ne okazis averioj. Nature mi vokas vin mem legi la fascinan rakontadon de Ulrich Lins. La nekonataj eroj al multaj niaj samlingvanoj estas certe sciindaj. Dum mia 50-jara velado en UEA-ŝipo almenaŭ 10 ŝipestroj vizitis Finnlandon, do mi celas al UEA-prezidantoj. El ili tute aparte restis en mia memoro Ernfrid Malmgren (1899-1970) el la 1960-aj jaroj.

Kiel ordinaran, vican esperantiston min silen-

tigis, entute mutigis trafa eldiro de la fondinto de UEA Hector Hodler el la jaro 1919: "Tio, kion ni emfaze nomas la 'triumfo de nia afero' ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesoj nun realigeblaj. Esperanto 'triumfas' ĉiufoje kiam ĝi servas al iu." Ofte oni ripete emas agnoski la geniecon de Zamenhof rilate la fundamentajn principojn de la Lingvo Internacia. Tute same ni devus kliniĝi antaŭ la genieco de Hodler, kiu kreis la plej grandan kaj plej longedaŭran organizan strukturon de la Esperantomovado, klarvide konstatas Ulrich Lins.

Preskaŭ kvardek paĝojn oni donas al Ivo Lapenna. Iuj detaloj estas tre tiklaj, kaj ili supozeble vekas diversajn opiniojn. Mia cerba kapacito ne sufiĉas por analizi diversajn prezentitajn erojn pri nia fama oratoro, sed ĉiuokaze indas atente tralegi ilin. Tre fekunde kompletigas la verkon de Lins kvazaŭ paralela kreaĵo de Humphrey Tonkin "Lingvo kaj popolo" (UEA-Rotterdam 2006), kiu ankaŭ traktas la agadon de Ivo Lapenna. Plaĉis al mi citaĵo el la nekrologo pri Lapenna. Juan Régulo Pérez skribas jene: "Pli grandan laŭdon mi ne scias fari al mia mortinta amiko ol klopodi lin kompreni: li ja konscie aŭ ne, iris vojon kiun al li diktis liaj personaj absolutoj. Kaj tiel li fariĝis la ĝis nun plej admirinda aristokrato / aŭtokrato de la esperantismo."

Varme mi gratulas al Ulrich Lins pro lia intereso rakonto pri nia prestiĝa Universala Esperanto-Asocio. En la UK en Haarlem 1954 Ivo Lapenna diris i.a. "Ni fiere flirtigu nian verdan standardon, por ke ĉirkaŭ ĝi kolektiĝu ĉiuj fortoj, kiuj ne nur diras, sed profunde sentas, ke la homoj estas antaŭ ĉio homoj kaj ke la tergloba povas esti komforta, hela domo por ĉiuj rasoj, por ĉiuj nacioj, por ni ĉiuj." - - - Honore al d-ro U. Lins mi tostos en Turku en la sama hotelo, Hamburger Börs, kie prof. Lapenna tranoktis

## Vintraj Tagoj kaj esperanto en babilo

Kouvolan Sanomat skribis 16.3.2009 pri Vintraj Tagoj de EAF en Kouvola. En Hufvudstadsbladet skribas Bengelsdorff 2.1.2009 en babilo pri lernado de lingvoj kaj kiel oni igas lerni tiujn en lernejo. Bengelsdorff rakontis pri kelkaj homoj, kiuj instigis lernantojn fari kaj lerni lernofakojn, pri kiuj ili ne normale interesas. B. havas du ekzemplojn. Unue li/ŝi rakontis pri Elspeth Randelin, kies lernantoj legas entuziasme kaj volontule multe da libroj malkiel junuloj ĝenerale. Due Bengelsdorff rakontas pri rektoro de lernejo, kie M.A. Numminen kaj liaj amikoj lernis esperanton, kvankam ili sciis, ke ili ne havas ekonomian aŭ praktikan utilon pri la lingvo.

En Kouvolan Sanomat ĵurnalistino Johanna Tenovirta skribis pri Vintraj Tagoj, kie ankaŭ Steleto festis sian 90an jaron. En la artikolo Tenovirta intervjuis Marjaliisa Parpala, kiu loĝas en Kouvola. Ŝi lernis unue esperanton en edukado de laboristaro de Kouvola en la 1970aj jaroj. "Hejme mi trovis esperantolibron de mia patro. La milito malkonektis lin el la hobia", rakontis Marjaliisa.

Nuntempe ŝi parolas esperanton hejme kun sia edzo Anatoly Lych. Ili povus ankaŭ paroli finnan, svedan, rusan, polan aŭ belarusan lingvojn kune, sed esperanto estas la plej bona. Poste, en la 1990aj jaroj ŝi partoprenis kun ŝia amikino en internacia evento en Norvegio. Tie ŝin imponis, ke dek homoj ĉirkaŭ sama tablo komprenis unu la aliajn, kvankam ili ĉiuj estis el apartaj landoj.

Pro esperanto ilia grupo de amikoj estas internacia. Anatoly komprenas iom finnan ling-

von kaj Marjaliisa rusan lingvon, sed ili parolas esperanton pli volonte. Ili legas librojn kaj gazetojn en esperanto kaj ankaŭ aŭskultas disaŭdigojn en esperanto el eĉ Vatikano aŭ Ĉinio. Marjaliisa havas leteramikojn en Novzelando.

Bazvortoj de esperanto estas el okcidenta Eŭropo kaj en gramatiko estas impresoj el slavaj lingvoj, rakontis la gazeto.

Kun la artikolo de Kouvolan Sanomat estis du fotoj. En la unua estis Tuomo Grundström, la prezidanto de EAF kaj en la dua foto estis Marjaliisa Parpola kaj Anatoly Lych kune.

*Jukka Noponen*

---

## FEJO kunvenis kaj decidis

FEJO havis jarkunvenon la 29an de marto kaj estrarkunvenon post ĝi la saman tagon. La elektita nova estraro estas la sama, kiu estris lastjare:

prezidanto Andrei Dumitrescu  
vicprezidanto Keith Uber  
sekretario Mira Anonen  
kasisto Paula Niinikorpi  
aliaj estraranoj Mikko Mäkitalo kaj Timo Pirinen

Vicestraranoj estas Patrik Austin kaj Alia Austin

En planoj por onta agado estas i.a. partopreno en Maaailma kylässä -festivalo (ne certe ĉu eblos), somera tendaro kaj kompilado de novformaj TTT-paĝoj. Oni celas fari tri FEJO-Bultenojn dum la jaro. Same kiel antaŭe daŭros funkciado de Diskejo (vendataj diskoj estas en la oficejo de EAF kaj oni reklamas ilin en TTT) kaj kultura interŝanĝo kun Italio (reprezentantoj de FEJO partoprenas en IJF dum pasko).

*Mikko Mäkitalo*

---

▷ 1971 dum sia tre sukcesa prelegvizito al finnaj universitatoj. Pripensojn miajn vekos ĉe gratulkaliko jenaj ciferoj: UEA havis 1969 entute 16 delegitojn en Turku, hodiaŭ nur 4!

*Jorma Ahomäki*

## Raporto de Salo

En la jarraporto de Esperantoklubo de Salo oni konstatis ke la plej grava okazaĵo dum 2008 estis la 30-jara festo la 8an de novembro. Al ĝi venis 25 personoj. Estis nunaj kaj antaŭaj membroj kaj gastoj el aliaj esperantoorganizaĵoj. La sola reprezentanto de ekstera mondo estis Ensio Huldén el Pohjola-Norden. La festo komenciĝis per kuna kantado de Satumaa–Fabellando. Akompanis Johan Puumala el Hanko, kiu ankaŭ alie muzikis dum la festo.

La vicprezidanto Carola Antskog parolis pri la sameco de esperanto kaj la finna lingvoj. La

ĉeestantoj rememoris pasintajn tempojn kaj rigardis la etan ekspozicion de bildoj kaj gazetondaĵoj. Fine oni kune vespermanĝis kaj dancis.

La jarkunveno (22.02.09) reelektis Matti Wallius kiel prezidanto. Post la kunsido oni per silenta minuto honorigis longdaŭran estraron Liisa Lehtonen, pri kies morto oni tiam ricevis informon.

*Carola Antskog*



*Tiel gaje la membroj en Esperantoklubo de Salo kantis pri la Fabela lando en sia 30-jara festo pasintjare. De maldekstre Sinikka Hangas(kasisto/sekretario), Marja-Liisa Wallius, Touko Tähinen kaj Matti Wallius (prezidanto).*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

## Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

**Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaamankatu 10, 15150 Lahti. ☎ [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ <http://esperantooulu.info/> [olli.pajula@gmail.com](mailto:olli.pajula@gmail.com)
- ♦ Salons Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ☎ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimi-to. ☎ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusana "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

# 2009

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
3	10.5.	15.5.	5.6.
4	10.7.	15.7.	5.8.
5	10.9.	15.9.	5.10.
6	10.11.	15.11.	5.12.

## Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu

15 C 65, 00530 Helsinki.



## Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus: vuosikerta \_ \_ \_ \_ .

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

---

---

---

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy \_ / \_ \_ .

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu \_ / \_ \_ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

---

---

---

Kestotilaus vuosikerrasta \_ \_ \_ \_ alkaen.

Tilaus: vuosikerta \_ \_ \_ \_ .

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

---

---

---

**Posti-  
merkki**

**Suomen  
esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65  
00530 Helsinki**

## Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Jutut 15.5.2009 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 15.5.2009 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

**Kopio Niini/Cityoffset, Tampere 2009**